PILO-PRESS
Interncia Informservo


N-ro 4/1973 22 jan 73

Jara abono 1973
20,- GM
================
Pĉk, Nürnberg
819 56 - 851
3a Jarkolekto

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 463649; 514269

Aperas ĉiusemajne

## Antaŭ 50 jaroj - rekorda kongreso




Nurenbergo. Antaŭ 50 jaro, en la jaro 1923, okazis en Nurenbergo, la urbo kun la 1a Esperanto-grupo kaj kun la 1a Esperanto-gazeto, la 15-a Universala Esperanto-Kongreso kun la rekorda partoprenantaro de 5000 kongresanoj.

En Nurenberge ankoraŭ vivas kelkaj esperantistoj, kiuj aktive partoprenis tiun kongreson, inter ili la geedzoj A. + C. Starke, kiuj kiel geaktoroj ludis rolojn en la kongresa teatraĵo "Natan la Saĝulo". Apude vi vidas la programfolion pri la prezentado kaj la bildon de Alexander Starke kiel Monaĥejano.

Dum la daŭro de la jaro Pilo-Press publikigos kelkajn artikolojn pri la tiama kongreso kaj personajn rememorojn de partoprenantoj.

1973 estu jubilea jaro por la esperantistoj en Nurnbergo kaj por la germanaj esperantistoj. Unu jaron antaŭ la UK en Hamburgo 1974 la rememoroj pri la Nurenberga kongreso estas bona instigo kaj informebleco.

*************

## Sukcesa kunlaboro

Ilustrowany Kurier Polski regule aperigas informojn pri la Esperanto-movado. Ankaŭ Pilo-Press kontribuas al tiuj informoj. Sed la gazeto informas ankaŭ pri Pilo-Press mem aŭ pri la Pilo-eldonaĵo "Forumo", kiel pruvas la maldekstraj eltranĉaĵoj de la 7/8 jan kaj 9 jan 73.

Sukcesa Pilo-Press estas unu el la surskriboj.

### PIERWSZE NUMERY ESPERANCKIEGO „FORUMO"

Nowe czasopismo esperanckie „Forumo" (Forum), którego wydawcą jest red. Ludwig Pickel w Norymberdze, poświęcone jest sprawom międzynarodowym.

Tematyką pierwszego numeru „Forumo" jest sprawa normalizacji stosunków PRL — NRF. Materiały opublikowane w „Forumo" utrzymane są w duchu przyjaźni i współpracy z Polską. W drugim numerze „Forumo" omówiono sytuację w Norwegii i Danii w związku z przeprowadzonymi w tych krajach plebiscytami w sprawie przystąpienia tych państw do EWG.

### SUKCESY „PILO-PRES"

Esperancka agencja informacyjna „Pilo-Press" cieszy się coraz większym powodzeniem. Jej informacje o ruchu esperanckim przedrukowywane są w wielu dziennikach i czasopismach. Ostatnio „Pilo-Press" znalazł większy dostęp również do prasy brytyjskiej.

## Sube: Pilo-Press pri IKP

Pilo-Press dankas al la redakcio de IKP kaj deziras ĉion bonan por 1973!

### „PILO-PRESS" O IKP

W ostatnim biuletynie Esperanckiej Agencji Prasowej „Pilo-Press" zamieszczono zdjęcia z placu budowy Zamku Królewskiego w Warszawie. Zdjęcia reprodukowano z „Trybuny Ludu".

„Pilo-Press" prowadzi akcję zbiórkową na rzecz budowy Zamku Królewskiego wśród esperantystów NRF. Pierwsza wpłatę dokonał osobiście w Warszawie jej wydawca red. Ludwig Pickel. Akcję tę „Pilo-Press" prowadzi dalej pod hasłem: „Międzynarodowa Solidarność Esperancka".

W tym samym numerze „Pilo-Press" reprodukowano informację zamieszczoną w IKP pt. „Telewizja NRF i esperanto" z równoczesnym tłumaczeniem tej wiadomości.

Malicaj diskoturnuloj

Merkrede, je la 16 jan 73 okazis la elsendo de la Dua Germana Televido ZDF pri mondlingvaj aferoj, anoncita en Pilo-Press, n-ro 1/1973, p. 3. Ni tuj diru, ke tiu elsendo estis granda seniluziiĝo por ni esperantistoj, kaj ĝi meritas esti forgesita de la rigardantoj kaj de ni esperantistoj. Fakte la elsendo celis nur ridindigi la klopodojn de tiu emerita inĝeniero 71-jara, krei novan "mondolingvon" kaj - sincere dirite- tiuj klopodoj ne pli meritas, sed la bedaŭrinda afero estas, ke je la rando oni ankaŭ rilatis al Esperanto, kiun jam dekomence oni deklaris "sensukcesa". Tiel la elsendo efikis ankaŭ por Esperanto negative al la rigardantoj. Kaj tiun malbonan efikon ankaŭ ne povis mildigi la mallonga eldiro - cetere kripligita de la redakcio - de d-ro Bormann. Kaj la rendevuo inter s-ino Wielgus kaj Hans Schütt devis resti enigma kaj nekomprenebla por la publiko.

Post la elsendo D-ro Bormann tuj reagis kaj skribis al ZDF, ĉar el liaj vortoj la decidaj 25 % estis forstrekitaj. En ili, la lasta frazo de la jam tre mallonga deklaro, li estis konstatinta, ke provoj kiel tiu de s-ro Mausfeld estas ne plu necesaj, ĉar Esperanto jam montris sian kapablon kiel esprimilo por ĉiuj celoj. Tiu klarigo estus povinta helpi, ke ne ekestu la malagrabla impreso de neseriozeco, de malperfekteco. Al tio ankaŭ kontribuus la intenco bedaŭrinde ne realigita, diri ion pri la impona Esperanto-mondkongreso (nia 59-a UK) okazonta en la Hamburga kongresejo-pruvo por la vivanteco de Esperanto. Nur por tion diri, la filmo kun la vortoj de d-ro Bormann estis farita antaŭ la kongreskonstruaĵo.

***********

29-a Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo

Sarajevo (mĝi) Sarajevo - la geografia centro de Jugoslavio, ĉefurbo de Socialisma Respubliko Bosnio kaj Hercegovino - estos la kongresurbo de la 29-a Internacia Junulara Kongreso de 21 - 27 julio 1973. Ĉar la kongreso okazos antaŭ la 58-a UK en Beogrado, la kongresanoj havos eblecon partopreni ankaŭ la UK-on. Sarajevo kiel urbo plena je kontrastoj en kiu interplektiĝas Oriento kaj Okcidento, pasinteco kun la nuntempo, prave esperigas bone vizitotan junularan kongreson. Des pli ĉar la kongresejo estos la Domo de la Junularo, moderna konstruaĵo destinita por ĉiaspecaj junularaj aktivecoj kaj la kongresanoj estos loĝigataj en luksa Studenta Domo (hotelo "Indeks"), 8-etaĝa konstruaĵo finkonstruita antaŭ unu jaro, kiu disponas pri 2-3-litaj ĉambroj.

La kongresa programo konsistos el laborkunsidoj, seminarioj, kultur-amuzaj aranĝoj, renkontiĝo kun la loka junularo, studvizitoj kaj ekskursoj. La ĉeftemo pridiskutota dum la kongreso estos: junularo kaj homa medio (kun prelegoj, referaĵoj kaj diskutrondoj).

Ĝis la 31.3.73 validas jenaj kotizoj: por membroj de TEJO depende de la aĝo inter 30 - 36 USdol; por ne-membroj inter 33-39 USdol.
Petu aliĝilojn kaj pliajn informojn de 29-a Internacia Junulara Kongreso, YU-71000 Sarajevo, V.Pelagića 8/I, Jugoslavio.

Denove: Fanfaro por Eŭropo

Londono (pe) Kiel ni jam informis en PP 2/73 Britujo festis la aliĝon al la Komuna Merkato per "Fanfaro por Eŭropo". Ankaŭ la Brita Esperanto-Asocio volis laŭtigi la Esperanto-voĉon kaj invitis po 1 junul(in)on por tiu festivalo. Sed la inviton bedaŭrinde nur sekvis 2 landoj el la naŭ nun apartenantaj al la Komuna Merkato: Venis al Londono Petra Engel el Hamburgo kaj Henrik Schleicher el Danlando. Pri la du junaj gastoj zorgis S-ro Platt, sekretario de BEA, kaj s-ro Buttinger, UEA-delegito por loĝigo.

Grandan por-esperantan manifestacion tiu du-landa mini-delegacio ja ne povis fari, tamen dum vizito ĉe Loxford High School en Ilford, kie Esperanto estas instruata en pluraj klasoj, ĉeestis ĵurnalisto kaj fotisto. Alia ŝanco propagandi Esperanton, malhelpis la brita fervojo. La vizitota lernejo, kie estos instruata Esperanto, estis en Maidenhead. Niaj du delegitoj eniris en vagonaron sur kajo kun la indiko "al Maidenhead". Sed la vagonaro neniam alvenis en Maidenhead, sed post 1 1/2 horo en Bicester. "Tiele pasis bela ŝanco por propagandi Esperanton", komentis Petra Engel.

La alia programo konsistis el muzeaj vizitoj, butikumado, el vizitoj al koncertoj kaj kelkaj institucioj. La piedpilkludo "La 6 kontraŭ la 3" interesis nur la danan gaston, Henrik Schleicher. Plej impresis Petra Engel la Oficejo de BEA en Holland Park Avenue. Pri tiu vizito ŝi opiniis: "Estis grandioze: ekstere 2 vitrinegoj kun libroj kaj varbaĵoj. Interne: i.a. granda muro plena de libroj vendotaĵ. En la kelo de la oficejo troviĝas presejo, sur ĝia 1a etaĝo bibliotekego, kiu enhavas preskaŭ ĉiujn E-librojn kaj -gazetojn, kiuj aperis."

Dufoje la kontinentaj gastoj partoprenis la kunvenon de la Londona Esperanto-Klubo, kiu cetere pere de Petra Engel salutas kore la germanajn Esperantistojn.

************

Salutoj el Taŝkento

La Esperanto-Komisiono de Uzbeka Amikeca Asocio, kiu havas interligojn kun 102 landoj, sendis novjarajn salutojn kaj dezirojn por novaj sukcesoj en nobla agado por paco kaj amikeco en la mondo. Personajn bondezirojn aldonis Petro Poliŝĉuk, la konata Esperanto-aganto en Taŝkento.

Dum pasintjara flugvojaĝo al Sovet-Unio Alfred Conzeth, leganto de Pilo-Press, loĝanta en Mettmann ĉe Düsseldorf, vizitis ankaŭ Taŝkenton kaj Petron Poliŝĉuk. Pri tio li skribas: Post alveno en Taŝkento ni tuj telefonis al nia samideano Pjotr Poliŝĉuk. Kaj post du horoj, je la 12-a, Petro jam estis en nia hotelo. Du horojn ni babilis ĉe bona uzbeka vino -sed tiam komenciĝis la tra-urba busveturado. Tamen, vespere je la 18-a ni ree renkontiĝis en la hotelo. Nun li kondukis nin tra la urbo al sia loĝejo, kie ni pasis gajajn horojn, ankaŭ kun lia edzino kaj filo. Je la 23a horo li kondukis nin al nia hotelo, de kie ni frumatene devis flugi al nova celo. Ni tre admiris la imponan aspekton de Taŝkento kun siaj 1.400.000 logantoj. En 1966 tertremo detruis la urbon, sed pro la helpo, kiu venis el ĉiuj anguloj de la vasta Sovet-Unio, nun la urbo ree kreskas al grandeco apenaŭ imagebla.

Parlamenta grupo por Esperanto en Britujo

Londono (ps-BEA) La unua kunveno de la nove starigita Parlamenta Grupo por Esperanto okazos en la brita parlamento la 24-an de januaro 1973. La kunprezidantoj de tiu kunveno estos parlamentano Ernle Money kaj parlamentano Lewis Carter-Jones.

Tiun sukceson rezultigis intensa skribkampanjo de anoj de la Brita Esperantista Asocio al siaj respektivaj parlamentanoj, el kiu evidentiĝis ke sufiĉe multaj britaj parlamentanoj simpatias al Esperanto (45 el la unuaj 100).

La celo de la grupo estas atentigi la parlamenton pri Esperanto, ĉefe per demandoj en la parlamentejo al la registaro. Ĝi estas tre grava paŝo por Esperanto en Britujo, kaj sendube ĝi kondukos al pliaj atingoj.

La programo de la unua kunveno estos:

1) Esperanto en Internaciaj Rilatoj -Ernle Money
2) Esperanto en Edukado -Raif Markarian
Lernejestro de Loxford High School
3) Esperanto kaj la Laborsindikata Movado - Alderman Horace Barks, O.B.E., antaŭa Lord-urbestro de Stoke-on-Trent
4) La Kulturaj Aspektoj de Esperanto - D-ro John Wells, Lekciisto pri fonetiko, Universitato de Londono

Akcepto en la Sejmo

Varsovio (PR) Laŭ informo de Pola Radio la vicprezidanto de la pola parlamento Sejmo akceptis la prezidanton de la ĉefa estraro de Pola Esperanto-Asocio (PEA), Stanisław Swistak, kiu informis la parlamentan vicprezidanton pri la agado de PEA kaj pri Esperanto ĝenerale. Li ankaŭ transdonis kelkajn el la novaj Esperanto-publikigaĵoj.

***********

La Semajno en la Radio (PP)

Varsovio. La ĉi-semajnaj politikaj komentarioj temis i.a. pri la interparoloj inter Breŝnev kaj Pompidou en Minsk, pri la rekomenciĝintaj Helsinkaj preparaj paroloj kaj la baldaŭa konferenco pri redukto de armeaj fortoj kaj armiĝoj en Vieno. Okaze de la liberiga datreveno de Varsovio (17.1.44) oni povis aŭdi felietonojn pri la nuna Varsovio, pri ĝiaj konstrulokoj, i.a. la Reĝa Kastelo. La leterkesto diskutigis i.a. leteron de s-ro Holmes pri la kritiko de Portlandaj kongresanoj, ke nur 1 estrarano de UEA ĉeestis la kongreson kaj ke okazis samtempe la Somera Semajno en Frostavallen. La E-ekspreso parolis pri la grava dutaga kunveno en Ljubljana (PP 2/73). Jerzy Grum proponis, ke tiaj iniciatoj devas esti internacie kunordigitaj, prefere de UEA. En la sama ekspreso ni aŭdis, ke IOE-gazeto ĉesis aperi, kaj ke la Esperanto-traduko de la libro "Fuda inter lupoj" laŭ eldiroj de Rudi Graetz aperos komence de 1974. - Berno. Claude kaj André Gacond finis sian leterkestan interparolon kun siaj aŭskultantoj kaj rakontis vive pri la ski-feriado en Adelboden. D-ro A. Baur prezentis la libron "Bonstato el nenio" kun la subtitolo "La aventuro de la svisa ekonomio". La prelegranto skizis kelkajn aktualajn problemojn de la svisa ekonomio.